

Siegfried Einstein,

## Al la aŭtuno

*tradukita de Manfred Retzlaff*

Ho pentrist' aŭtun', restigu  
vin ankoraŭ tie ĉi!  
La folion karminigu,  
ĝis de l' arbo falas ĝi.

La penikojn enfarbigu,  
pentru ĉion per purpur',  
kaj la pomojn vi ruĝigu,  
estu bunta la natur'!

Lasu al la papilioj  
florojn, lumon oran vi;  
de sopir' kaj fantazio  
bildojn pentru vi al mi.

Se la bildon vi finintas,  
trinku vian vinon ni.  
Fuĝu, antaŭ ol venintas  
vintra frosto kaj glaci'!

...

Siegfried Einstein,

## An den Herbst

*tradukita de Manfred Retzlaff*

O Maler Herbst, bleibe  
noch ein bißchen hier.  
Färbe das Blatt karminrot,  
bis es vom Baum fällt.

Tauche die Pinsel in Farbe,  
bemale alles mit Purpur,  
und röte die Äpfel,  
die Natur sei bunt.

Lasse den Schmetterlingen  
Blumen und goldenes Licht;  
Bilder der Sehnsucht und Fantasie  
male mir.

Wenn du das Bild vollendet hast,  
lasst uns deinen Wein trinken.  
Fliehe, bevor gekommen ist  
der winterliche Frost und das Eis.

...

*Traduko de la Germana poemo "An den Herbst" de SIEGFRIED EINSTEIN (\*1919-11-30 – †1983-04-25) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (\*1938-11-04).*

*Arg-653-1313 (2012-11-13 18:02:25)*

*Pri la aŭtoro vidu ankaŭ la retejon <https://sites.google.com/site/siegfriedeinstein/>.*

*Traduko de la Germana poemo "An den Herbst" de SIEGFRIED EINSTEIN (\*1919-11-30 – †1983-04-25) en la Germanan de MANFRED RETZLAFF (\*1938-11-04) en 2012-12-14.*

*Arg-653-1314 (2012-11-14 11:01:58)*

*Wörtliche Rückübersetzung der Esperanto-Fassung*